

# Gazeto Andaluzia

ANDALUZIO PER SI POR HISPANIO KAJ LA HOKARO



N<sup>o</sup> 18 \* 5-a JARKOLEKTO \* FEBRUARO '88

(19) D.L. HA-1136/88

  
Córdoba 1992  
CAPITAL JARNOVA DE ESPERANTO

POST LA SUKCESA TOROKSA ANDALUZIA KONGRESO

NI JAM LABORAS POR ...

  
  
erezo



6-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

13-a / 15-a DE AŬGUSTO DE 1988.

# GAZETO

# ANDALUZIA

Fondita en 1910 de D. José Garzón Ruiz

ADRESOJ

Oficiala Organo de A.E.U.

\*\*\*\*\*

EDITA - ELDONAS:

Asociación Andaluza de Esperanto  
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Grupo Esperanto  
Apartado 611  
14080 CORDOBA

"Inscrita en el Registro de Asociaciones  
del Ministerio del Interior del Estado -  
Español con el número 56173"

Grupo Esperanto  
Apartado 3275  
29080 MALAGA

REDAKTOROJ:

Alberto Franco Ramirez	Seviljo
Andrés Martín González	Malago
J.M. Rodríguez Hernández	Kordovo

S.E.J.O.  
Avda. Reina Mercedes, 49 1ª  
41012 SEVILLA

Grupo Esperanto  
Facultad de Ciencias  
GRANADA

"La opinioj ĉi tie verkitaĵ apartenas nur  
al la subskribantoj"

Asociación Sevillana de Esperanto  
Sol, 75  
41003 SEVILLA

Presita ĉe Torrox - Malago

Kompostado: J.Herrero

Grupo Esperanto  
Apartado 13  
29770 TORROX

\*\*\*\*\*  
ENHAVO

Grupo Esperanto  
I.B. "Julio Rodríguez"  
MOTRIL

Ĉefartikolo .....	3
Andaluza Agado .....	4
I.L.E.I. ....	7
Libro-Servo de A.E.U. ....	8
Andaluzia Kongreso en Torrox.	9
Kunlaboraĵo .....	11
Entrenationo .....	13
Kurso de Esperanto .....	15
Benata Sonĝo .....	17
Nun Ni .....	19
Universala Kongreso Varsovio.	21

Grupo Esperanto  
Mariano de Cavia 34  
LA LINEA

Grupo Esperanto  
Apartado 320  
JEREZ DE LA FRONTERA 11480

\*\*\*\*\*



Ni komencis novan jaron, la postjubilean. Estus tre facile komenti mirindaĵojn okazintajn ĉe la Movado dum 1998-a. Ja, kiel diras iu fama proverbo, "nenio estas blanka aŭ nigra, ĉar ĉio dependas de la koloro de la vitro tra kiu oni rigardas". Laŭ iuj, ni sukcesis; laŭ aliaj, tute inverse, ni fiaskis. Mi ne malŝparos tempon parolante pri la preterito. Mi opinias, ke niaj problemoj tiel gravas, ke ni devas pensi pri la futuro. Krome, evidentas, ke la Centjarigo nek solvis, nek povis solvi la problemojn suferatajn de la Movado en Andaluzio. La Jubilea Jaro estis gravega ŝanco por festi Esperanton kaj por atentigi ĉiujn pri la avantaĝoj devenantaj de ĝia uzado. Sed nenio plu. Konvinku nin, ĉio funkcios same - aŭ eĉ malbone - ol antaŭe, se ni ne atingas apliki efikajn solvojn en la nuna situacio. Situacio neniel kontentiga, bedaŭrinde.

Neniu normala persono aganta izole, sukcesas en ĉi tiu entrepreno. Hodiaŭ necesas unuigi ĉiujn niajn fortojn, labori laŭ prioritatoj kaj plenumi la taskojn signitajn. Resume, ke ni estu veraj kaj aŭtentikaj esperantistoj.

Kiel povas ajna AEU-ano vivi aŭtentike sian esperantis-tecon? Tute simple, penante por realigi niajn ĉiamajn revojn, nome, la ĉeesto de Esperanto en la amaskomunikiloj (radio, televizio kaj gazetaro), la oficiala instruado de Esperanto en la Lernejoj kaj la aplikado de E-o en la Scienco, la Tekniko, la Kulturo kaj, ĝenerale, en la ĉiutaga vivo. Por atingi ĉion ĉi tion necesas agadi laŭorde kaj plenumante la agadplanon estigitan.

Kiam nia venonta Kongreso (la 6a) okazos, AEU, t.e., ĉiuj AEU-anoj, devas esti atinginta: a) disvastigi Esperanton perradie, perkoresponde kaj per normalaj klasoj en pluraj urboj/vilaĝoj; b) enkonduki Esperanton en la politikajn etosojn; c) plialtigi nian Esperantan Kulturon kaj ĉ) atingi, ke la Nacia Registaro rekonu Esperanton kiel unu el la lingvoj lerneblaj en la Unua - kaj Duagrada Lernejoj.

Denove mi ripetas tion diritan supre: Por ke Esperanto sukcesu en Andaluzio, estas necese, ke ĉiu AEU-ano laboru kune kaj akorde kun la ceteraj samideanoj sub la kunordigo de la Estraro.

Nun, se vi ŝatas vin esperantisto, bonvolu plenumi la kunmetitan enketon. Poste, tuj, resendu ĝin al la adreso de AEU en Malago.

Kaj ne forgesu, ke "la faktoj - ne la pravigoj - estas vera mezuro de la amo".



Andrés Martín  
Prezidanto de A.E.U.

## GRAVA AVERTO

I.L.E.I. (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kiel sekcio de H.E.F. (Hispana Esperanto-Federacio), intencas oficialigi "KOLEGIO DE PROFESOROJ DE ESPERANTO"-n (oficialle rekonita de la Stato). La Ministerio pri Edukado petis de ni iujn dokumentojn, kaj do ni bezonas tre urĝe sciigojn de tiuj esperantistoj, kiuj havas ian diplomon - ne gravas la nivelon - pri Esperanto, aŭ de tiuj esperantistoj, kiuj gvidis aŭ gvidas E-kursojn, kaj deziras esti membroj de la estonta Kolegio

Bonvolu, se vi estas en unu el tiuj situacioj, sendi rapide al ILEI (Sol, 75, 41003 SEVILLA) viajn:

- nomon kompletan
- adreson
- identigan numeron (D.N.I.)

Ci tiu afero estas tre grava por la oficialigo de la instruado de Esperanto en Hispanio.

## MALAGO

Dum la unuaj monatoj de ĉi tiu jaro 1988, ni ricevis la viziton de jenaj eksterlandaj gesamideanoj:

- S.Molnár, el Hungario.
- Kornelja kaj Henriko Lindkvist, el Svedio.
- Esa Lang kaj edzino, el Finnlando.
- A.Leslie, brita esperantisto loĝanta en Jimena de la Frontera.
- S.Egerton, el Britujo.

S-ano Molnár vojaĝis kun la Futbalo-Teamo VIDEOTON, kiu restis en nia urbo kelkajn tagojn invitita de la Futbala Klubo Malaga.

Kun la geedzoj Lindkvist kaj Lang ni faris agrablan ekskurzon al diversaj malagaj vilaĝoj.

## JEREZO

Adreso de la esperanta grupo en ĉi tiu vilaĝo:  
Grupo Esperanto de Jerez, Apartado 320, 11480 JEREZ

Nova adreso de S.E.J.O (Sevilja Esperanta Junulara Organizo):  
Avenida Reina Mercedes, 49 1º, 41012 SEVILLA



## SEVILJO

### JAŬDAJ PAROLHOROJ EN SEVILJO

\*\*\*\*\*

Tiu nia diskonata aktivaĵo jam dujariĝis. Plurfoje la organizantoj troviĝis kvazaŭ tra dezerto kaj praarbaro, sed ne rezignis la penon pludaŭrigi ĝian ĉiu-semajnan realigon. En oktobro-85 komenciĝis nia aventuro. Nia celo: atingi kunvenigi esperantistajn rondojn ĉiu-ĵaŭde, sciiĝi pri novaj temoj, pligrandigi nian vortoprovizon kaj oferi etoson al tiuj, kiuj lernas Esperanton en nia urbo. Antaŭen ni nun pluiras kaj ankoraŭ en la estonto vi aŭdos pri ni.

Jen skizo de la vintra sesio de la pasinta jaro:

29an Oktobro: Ludoviko Gilpérez klarigis al ni ĉion rilatan al la Funkciado de foto-aparato, kun praktikaj ekzemploj.

5an Novembro: Pako la tria prezentis novan perspektivon de la realo (ĉu realo?) per sia temo Kvardimensia geometrio: la hiperkubo.

12an Novembro: Denove Antono Rodriguez elpremis la du lastajn tradukojn el Lorca kaj el tie studiĝis ĉiaj parolturnoj kaj tradukaj malfacilaĵoj. La titolo estis Lingva prikomento sur la lastaj tradukoj el Lorca.

26an Novembro: Post unu ripozsemajno reaperis Manolo López kaj alvenis la momento diskuti pri aktuala politikaj temoj. La temo estis Sindikata balotado en la ŝtata funkciularo.

3an Decembro: Temo, kiu certe kapturnigas la fremdajn lernantojn de la hispana kaj ĝia versio en esperanto: ser-estar, esti-stati. Historia kaj priskriba analizo, far Alberto Franco.

Ni kuraĝigas de tie ĉi ĉiujn hispanajn esperanto-grupojn organizi aktivaĵon kiel ĉi tian, kiu certe vigligas nian esperanto-kapablon kaj kunlaboras al ĉies memklerigado.

\*\*\*\*\*

### PEGALAJAR

La pasintan monaton Oktobron nia linaresa samideano Alfonso Escamilla Roa donacis publike al la Urbestro kaj Konsilantaro de la jaena vilaĝo Pegalajar portreton de la Reĝa Moŝto Johano Karlo la Unua. Ĉi portreto prezidos la Kunven-ĉambron de la Urbodomo de Pegalajar. La Urbestro dankis lin pro la donaco dum solena kunveno, pri kio aperigis informon la ĵurnalo JAEN.

Dum tiu akto nia elstara samideano profitis la okazon por repeti al la unua loka estro nomigi straton sub la nomo IDIOMA ESPERANTO. Apogis tiun peton ekslernantoj de A.Escamilla kiuj ĉeestis la akton. La Urbestro promesis studi la peton kaj proponi ĝin al la Konsilantaro, elstarante la fakton ke ĵuse la urbo Torrox nomigis straton sub ĉi kara nomo.

\*\*\*\*\*

Nia monata informilo "MONATE CE VI" ricevis jenan numeron de la Lega Depono: MA-1480/1987.

\*\*\*\*\* - 5 -



\* **Jurnalo CORDOBA** publikigis la pasintan 19an de januaro, artikolon de nia samideano Pedro J. Gosálvez, kun la titolo "El Esperanto, cien años vivo". Ankaŭ, kelkajn tagojn poste oni povis legi sur ĉi-sama **jurnalo** anoncon pri Esperanto-kurseto en I.B. López Neyra.

\* Ni jam disponas pri la statutoj kaj la sidejo. Post nemultaj tagoj, nia loka esperantista asocio K.E.A. estos leĝigata.

\* La pasintan semajnfino de la 9a ĝis la 10a de Januaro, vizitis nin en Kordovo du gesamideanoj: Anne Ambles, el Nancy (Francio) kaj Arnau Torres, el Sabadell. Ci tie ni parolis al ili pri niaj aktivaĵoj kaj ni ĉiuj pasigis du agrablajn tagojn. Anekdote ni diros, ke Arnau intencis danci sevilkantojn kaj, malgraŭ ke li dancis seviljkantojn tre simile al sardanoj, lia agado estis, laŭ opinio de la atestantoj, kontentinda.

\* Nia samideano Rafa Pleguezuelos estis elektita Prezidanto de Club de Amigos de la Unesco antaŭ nelonge. Tio estas bona novaĵo por ĉiuj, ĉar per lia helpo ni povos labori plirime por Esperanto en Kordovo.

\* Ni pripensas unu esperantistan semajnon en Kordovo. Ci semajno konsistus el babiladoj, ekspozicioj pri ĉiaj materialoj, kolokvoj, ktp. Oni informos pri ĝi post ĝia okazo.

\* Kiel ni scias, nia samideano David Galadí sin okupis pri la esperanto-klasoj en I.B.Séneca. Nu, ne pro lia restado en Granado, kie li studas Fizikon, la klasoj finis. Ci-jare gvidas tiujn klasojn lia fratino Maite.

#### VALVERDE DEL CAMINO

Grupeto da junaj studentoj de la huelva vilaĝo Valverde del Camino komencis aŭtodidaktan kurson antaŭ kelkaj monatoj. Kvankam la lerniloj ja malabundis, ĉefe ĉar ili nur disponis pri la vortareto de Lexicon Sopena, la rezultoj estas plenesperigaj. Unu el la lernantinoj, kiuj nun studas en Seviljo, profitis vesperon por viziti la lokan grupejon de Seviljo. Kompreneble la Seviljaj Grupoj promesis ĉiajn helpojn por disvastigi Esperanton ne nur en Valverde del Camino, sed ankaŭ en la huelva provinco. Ni ĉiuj esperas vidi ĉi novajn junajn gesamideanojn dum la venonta Jereza Kongreso.

#### VILLANUEVA DE CORDOBA

La Urbestraro de la vilaĝo Villanueva de Córdoba eldonis la libron "Teatro Breve para la Escuela" de nia samideano Juan Ferrero Carrasco. Juan estas esperantisto, membro de AEU, profesoro kaj esploranto de la parol-maniero de la Pedroĉ-Valo. Nia samideano kolektis en tiu libro sep teatrajn skeĉojn por infanoj. La **jurnalo CORDOBA** aperigis informon pri la eldono de ĉi tiu libro kaj la Bulteno de la Kordova Akademio de Arto kaj Scienco aperigis recenzon pri ĉi tiu verko elstarante la pedagogian valoron de la libro.



NOVA EKZAMENA KAJ DIPLOMA STUD-PLANO  
POR LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN HISPANIO

(Desegnita kaj aprobita de ILEI-Hispanio  
kaj la Instruada Servo de A.E.U.)



La kunordigantoj de ILEI-Hispanio (Instrua Sekcio de HEF) kune kun la Instruada Servo de AEU, kunveninte por analizi la eblon reformi la aktualan sistemon de la instruado de Esperanto en Hispanio, alvenis al konsento kaj desegnis jenan stud-planon, kiu funkcios en la tuta Stato:

A) UNUA NIVelo: ELEMENTA LINGVO-SCIO.

Praktika branĉo I  
(nur lingvo-scio)

Teorio-praktika  
branĉo I  
(por kursgvidantoj)

-Esperanta Gramatiko  
-Historio de la Movado I  
-Esperanta Literaturo  
-Esperanta Agado I  
-Metodologio de la Instruado de Esperanto I

B) DUA NIVelo: MEZA.

Praktika branĉo II  
(nur lingvo-scio)

Teorio-praktika  
branĉo II  
(por esperantistaj  
instruistoj)

-Esperanta Lingvistiko  
-Historio de la Movado II  
-Esperanta Literaturo II  
-Esperanta Agado II  
-Metodologio de la Instruado de Esperanto II

C) TRIA NIVelo: SUPERA.

Kotizo al I.L.E.I. (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)  
por la jaro 1988a: 1.200,- (MIL DUCENT) pesetojn.

Skribu al: I.L.E.I., Sol, 75, 41003 SEVILLA.



T I T U L O	PRECIO
<u>Diccionario de Bolsillo</u> (Esperanto-Español y Español-Esperanto, de Editorial Sopena, 382 págs.) .....	400,--
<u>Diccionario Esperanto-Español</u> (E.Tudela, 175 págs.) .....	675,--
<u>Parolu E-on</u> (Curso elemental de Esperanto en comics. Formato grande. Portada a color. 50 págs.) .....	475,--
<u>Curso Medio de Esperanto</u> (Apuntes en esperanto sobre "Historia del Movimiento, Historia de la Literatura y Gramática") .....	450,--
<u>El Esperanto</u> (Libro de consulta en castellano) .....	475,--
<u>Privilegia Vojo</u> (Libro de texto en esperanto) .....	550,--
<u>Historio de Esperanto</u> (Historia del Esperanto, en 3 volúmenes) .....	1.950,--
<u>Pandemonio</u> (Primer libro editado por la Asociación Andaluza de Esperanto. Contiene obras premiadas en los Concursos anuales de la Asociación Universal de Esperanto) ..	650,--
<u>La Familio de Pascual Duarte</u> (de Camilo José Cela, 166 págs.) .....	600,--
<u>Sanga Nupto (Bodas de sangre) y</u> <u>La Domo de Bernarda Alba (La Casa de Bernarda Alba.</u>	875,--
<u>Sentempa Simfonio (poem-antología hispana)</u> (Fernando de Diego, 157 págs.) .....	600,--
<u>La kraboj kun oraj pinĉiloj</u> (Aventuras de Tin-Tin en esperanto) .....	875,--
<u>La Nigra Insulo</u> (Aventuras de Tin-Tin en esperanto) .....	875,--
<b>CASETS MUSICALES</b>	
<u>Amplifiki grupo de rock interpreta TUTE NE GRAVAS .</u>	1.250,--
<u>Horo da opozicio. Canta Gianfranco Molle. ....</u>	1.000,--
<u>Per nia nura vol'. Canta Suzanna .....</u>	1.175,--
<u>La Vojo. Canta G.Molle .....</u>	1.000,--
<u>Danĝera ul. Canta Marĉela .....</u>	1.000,--
<u>Venos Liber. Canta Marĉela .....</u>	1.100,--

NOTA: En estos precios no va incluido el gasto de envío.

PEDIDOS: Asociación Andaluza de Esperanto, Apartado 3275, 29080 MALAGA.



Multe oni parolis pri la 5-a Andaluzia Kongreso de Esperanto antaŭ ol ĝia okazigo; la kovriloj de ĉi revuo kaj la propagando de AEU dum preskaŭ ja unu jaro ade invitis ĉiujn ĉeesti kaj partopreni en tiu Kongreso. Torokso estis preskaŭ l'unika vorto kiu estis encerbe de ĉiuj andaluziaj gesamideanoj dum 1987. Sed... kio okazis tie kiam finfine alvenis la dato? Cu eblus verki kelkajn paĝojn pri tiuj neforgeseblaj Toroksaj tagoj? Por tiuj kiuj ne havis la ŝancon partopreni mi provos skribi kelkajn liniojn pri tio.

Kvankam la Kongreso oficiale ne komenciĝis ĝis la sabato 10a de Oktobro, la unuaj gesamideanoj troviĝis en Torokso jam dum la vespero la antaŭan tagon. Ili, kelkaj baskoj kaj valenciano, estis akceptitaj de la Prezidanto de la LKK kaj vera organizanto de la Kunveno, Antonio Gonzalez Alvarez. Li helpis ilin trovi la restadejon. Dum la mateno de la sabato 10a, la unuaj andaluziaj gesamideanoj, ĉefe tiuj de Malago, renkontiĝis ĉe la anoncanta restadejo. La vetero (pluvis dum la tuta antaŭa tago) jae minacis ne nur la disvolvodon de la ontaj programeroj sed ĉefe la partoprenadon de gesamideanoj kiuj planis la vojaĝon peraŭte al Torokso. Tamen ĉio daŭriĝis normale, la oficiala kunveno prokrastiĝis pro la fakto ke nombra grupo da gesamidea-

noj ne atin-  
je akurata  
tiu prokras  
la por la ge  
kiuj profi  
horojn libe  
eble plej  
pari la ĉam

La resta  
nu el la  
eltrovoj de  
traŭ modes  
samideanaro  
(abunde) kaj  
forta kaj  
ni povis pa  
disvolvigi  
kaj eĉ brue

Finfine,  
la granada  
teraj mala-

La oficiala malfermo de la Kongreso okazis tiam; salutis reprezentantoj de Malago, Kordovo, Seviljo, Jerezo, La Lineo, Kadizo, Granada kaj Torokso. Dum tiu vespero ni vizitis la grotojn de Nerño (8 kilometrojn for) kaj poste, ree en la kongresejo okazis projekciado de diapozitivoj far la Natur-Asocio "Andalus" pri la Laguno de Fuentepiedra, kaj pri Speleologio far la Speleologia Grupo de Seviljo. Kaj fine okazis la unua prelego de la serio "Nun temas pri...", parolis Rikardo F. Albert pri la metodoj por plibonigi la prononcadon de Esperanto far la kastili-parolantoj.

Kiam preskaŭ ĉiuj gesamideanoj iris enlitiĝi grupo da gejunuloj iris al Nerño kie dum tiuj tagoj okazis la Popolaj Feriaj Tagoj. Ankaŭ en tiu vilaĝo la Estraro kaj reprezentantoj de AEU estis intervjuataj de loka radiostacio.



gis la lokon  
horo. Tamen -  
to estis uti-  
esperantistoj  
tis unu / du  
rajn por kiel  
komforte pre-  
brojn.

dejo estis u-  
plej guindaj  
la LKK, kon-  
ta pago, la  
rajtis mangi  
resti en kom-  
tipa loko kie  
roli, ripozi,  
ĉiujn agadojn  
tumulti.

la seviljanoj  
noj kaj la ce-  
ganoj venis.



Dum la mateno de la dua kongresa tago (dimanĉon llan) okazis unu el la asembleoj de AEU; oni pritraktis interesajn temojn - vivo de la regiona asocio kaj de la lokaj grupoj, revuoj, kursoj, estonto de nia movado en Andaluzio, ktp -. Je la 13,00 horo ĉiuj gesamideanoj (eĉ pli ol 50) marŝis al la vilaĝo Torokso (memoru ke ni ja restis ĉe zono konata kiel Torokso-Kosta, apud la marbordo). Tie la Urbestro kaj la Urbokonsilantaro akceptis nin. Sendube tiuj horoj estis emociigaj, dum luksa bankedo la Urbestro, la Prezidanto de AEU kaj eksterlanda samideanino profitis la okazon por saluti kaj deziri ĉion bonan al tieaj ĉeestantoj. Ĉiuj ni pensis ke Esperanto estis publike aknoskata de la lokaj aŭtoritatuloj, elstarante la Urbestro mem la eblan gravecon de la Kongreso kaj de Esperanto por diskonigi tutmonde la allogan vilaĝon Torokso. Sed jae la surprizo venis poste; en antaŭmonata kunsido la Urbeŝtraro de Torokso jam decidis nomumi avenuon sub la nomo ESPERANTO, kaj la oficiala inaŭguro okazus dum la Kongreso. La avenuo estis apud la kongresejo kaj en la montr-tabulo apud la nomo Esperanto aperis verda stelo.

Denove okazis paroladoj de la Urbestro kaj ada fotado.

Dimanĉe vespere AEU denove okazigis asembleon pri diversaj temoj, dume aliaj gesamideanoj kaj etnombra publiko vidis la riĉenhavan Libro-servon kaj la pluraspektajn ekspoziciojn: tie AEU montris antikvajn librojn kaj broŝurojn, kaj aliaj samideanoj tutmondajn poŝtkartojn kaj E-algluaĵojn. Same dum tiu vespero la Urbeŝtraro regalis nin per diversaj dancoj de la Folkloro Danc-Grupo de Torokso, ja estis vidindaj la okulojn de la gesamideanoj (ĉefe de tiuj ne-andaluzaj) kiuj atente kaj brile rigardis la turnigojn de la buntaj kostumoj de la dancistinoj.

Poste ni vidis la filmon "Post 20 jarcentoj", filmo produktita en esperanto de la EEK kiu montras la historion de la eŭropeisma ideo dum la lastaj 20 jarcentoj de nia kontinento. Ankaŭ oni amuzigis la etoson per la projekcio de lumbildoj pri aliaj E-kongresoj, eble tiam ni eĉ lernis ridi pri ni mem rigardante malnovajn fotojn. La tago ne finis tiam, almenaŭ por la gejunuloj kiuj estis ĝis la 2a horo matene rakontante spritaĵojn, kaj kelkaj eĉ en esperanto!

La lundon 12an estis la lasta kongresa tago. Surprize oni vekigis ĉiujn gesamideanojn pere de laŭtega kasedo de Amplifiki (la rok-muzika E-Grupo) kaj kurioze... neniu protestis. Okazis dum tiu mateno la lasta kunveno de AEU kaj du novaj prelegoj de la serio "Nun temas pri..." Alberto Franco parolis pri la andaluzia parolmaniero kaj J.M.Rodriguez pri la ideo krei Esperantistan Staton en 1907. Post la mangado, la gekongresanoj en frateca harmonio kantis kaj deklamis kune; nia granada amiko J. Ignacio Bravo bele gitarludis kaj kantis. Tiuj belaj kantoj emociigis nin dum l'adiaŭo. Poste okazis la solena malfermo de la Kongreso, oni disdonis la diplomojn kaj Andrés Martín, la Prezidanto de AEU, dankis ĉiujn pro la partopreno kaj ege la organizantojn pro la sukceso de la kunveno. Post tio la Kongreso finiĝis; ope la gesamideanoj marŝis aŭtomobile al siaj urboj.

Se krom laŭtaga kroniko oni petus mem-opinion pri la Kongreso, mi ja dirus ke ĉio estis alloga kaj ĉarma. Porĉiame mi memoros, eble kvazaŭ encerbaj detaletoj, la E-standardon ĉe la enirejo de la Restadejo, la amikecan etoson dum la aktoj kaj ĉefe la helan rideton kiujn ĉiuj gesamideanoj montris kiam ili marŝis al siaj urboj, tio pruvis ke ĉio en Torokso disvolvigis sufiĉe bone.



## EN TIAJ KONDIĈOJ LA KUNVIVADO ESTAS MALFACILA

Estas evidente, ke la kunvivado konsistas el tre diversaj eroj. Ne sufiĉas diri: mi amegas vin; mia vivo sen vi ne havas celon; kun pano kaj vi la vivo por mi jam sufiĉas... kaj multaj aliaj diraĵoj, kiuj celas pravigi la povon de la amo, de la reciproka amo, kompreneble. Malgraŭ tiuj asertoj, poste en la reala vivo kaj kiam kun la jaroj, la amo fariĝas la ĉiutaga pano en la rilatoj de la paro, de viro kaj virino, miksiĝas multaj aliaj, versajne ne gravaj, cirkonstancoj, sed kiuj havas transcendan influon en la disvolviĝo de la vivo de ĉiu paro.

Post tiu prezentado pri la rilata stadio de la paro, en kiu la amo ne mankas, vi jam rajtas pensi, nu, kia filozofio estas tiu de la subskribinto?. Mi ne rakontos al vi pri aferoj de aliaj personoj, mi eksponos al vi la cirkonstancojn ekzistantajn en mia, nia geedza vivo, en kiu amo ne mankas. Sed jen denove la demando, ĉu la amo sufiĉas por bona kunvivado? Fakte mi ne kapablas respondi tiun demandon, ĉar laŭdire ĉiu geedza paro estas aparta mondo.

Nu, jen kio okazas al mi, la afero estas simpla: mia edzino nenion komprenas pri futbalo, tereno en kiu mia edzino estas la plej granda analfabetino de la tuta Hispanujo. Vi bone komprenas la influon de la piedpilka ludo en nia moderna vivo. Ja, multe oni povas skribi pri ĝi kaj fakte multe oni skribas pri tiu sporto, kiu fanatigas la homojn bedaŭrinde ne esperantlingve.

La dimanĉoj, kiam ĉiu moderna, edukita, progresema kaj klera homo, scivoleme atendas ke la diversaj informiloj sciigu al ni pri la diversaj rezultatoj de la piedpilkaĵoj, mi devas resti muta. Mi havas nenion kun kiu konversacii, diskutadi kaj komentarii la diversajn okazintaĵojn de la futbala dimanĉo. Ĉu vi opinias, ke tio ne estas grava kaj granda puno por mi?, ĉu vi

opinias ke la amo povas anstataŭi la futbalon? Mi ne dubas, se vi estas inteligenta, ke via respondo estos: ne eblas, la futbalo estas tiom necesa kiom la amo. Mi vin gratulas, fakte vi estas tre altgrade edukita.

La nekompreno kaj miskompreno de mia edzino pri tiu temo piedpilkluda estas tiom nekomprenebla, ke iuj demandoj ŝiaj ridigas min: iam ŝi demandis al mi, kion faras tiu sinjoro, kiu kuradas je unu loko al alia, ĉiam nigre vestita? Ĉu li estas la enterigisto?. Mi penis klarigi al ŝi, ke li estas la arbitraciisto, ke li estas kiu diras ĉu la futbalisto agis bone aŭ malbone laŭ la regularo. Nu, ĉu imagas, kion ŝi respondis al mi: Kial se tiuj futbalistoj ne scias ludi laŭ la piedpilka regularo oni permesas al ili preni parton en tiuj matĉoj? , ŝi diris. La vero estas amiko mia, ke mi ne sciis kion respondi. En alia okazo ŝi diris al mi, nu, kial tiu sinjoro tiu ludisto sin metas antaŭ la golejo kaj sen nenia malhelpo piede puŝas la pilkon al la tero? Ĉu vi opinias, ke estis facile por mi klarigi al ŝi, ke ĝi signifas punon, "penalty". Poste ŝi demandis al mi, kion signifas la vorto "penalty", ŝajnas kvazaŭ tiu vorto estus angla?. Bravo, mi diris, ĝi estas angla vorto. Do, ŝi interrompis min, ĉu tiu ludo ankaŭ estas propraĵo de la usonanoj?. Kara amiko, mi ne scias ĉu vi enuas legante tiujn stultaĵojn de mia edzino. Pardonu min, sed ankaŭ vi komprenu, kiom mi devas suferi. Kredu min, ke la kunvivado tiusence ne estas facila. Se mi ne povas ĝui la plezurojn de tiu sporto, pri kiu miloj kaj miloj da homoj eĉ freneziĝas, kion mi celas en ĉi tiu vivo?.

Si apenaŭ komprenas, el kiuj urboj estas la diversaj teamoj. Evidente, ŝi scias, la Barcelona teamo estas de Barcelono, kaj tiu de Madrid estas de Madrido. Tamen ŝi estas iomete pli lerta, kiam oni klarigas, kiu estas la unua en la vico kaj kiu estas la lasta.



En la nuna jaro, si apenaŭ interesiĝas, ĉar si diras: ĉiam estas la sama kanzono, ĉe la kapo troviĝas "El Madrid" kaj en la lasta posteno "El Sabadell". Ankaŭ si informiĝis, ke "El Barcelona" neniam venkas. Mi penas klarigi al si, ke tiuj postenoj estas provizoraj, ke ĝis la fino de la Ĉampionado nenion oni povas diri. Ke tiu momenta situacio de la teamoj oni ŝuldas al diversaj cirkonstancoj. Kial ludi se ili ĉiam fiaskas?, si opiniis.

Malgraŭ tio, si ne malpermesas al mi spekti la futbalon per la televida aparato. Mi invitas al si sidiĝi apud mi, kaj foje si akceptas mian inviton. Tamen ŝia kunsidado estas terura turmento por mi. Si komencas demandi al mi pri ĉio. Mi kun la plej bona intenco komencas detale ĉion klarigi, sed vane, miaj lecionoj ne kapablas sin eduki pri tiom moderna sporto. Estas iuj demandoj, kies respondo frenezigas min, jen iuj: Kial ĉiuj kuras post la pilko? Kial la golgardisto povas uzi la manojn kaj la aliaj ne? Kial la ludistoj ĉiam uzas mallongan pantalonon? Kial la televida parolisto diras sferan, se ĝi jam estas pilko? Kial de tempo al tempo tiu sinjoro nigre vestita uzas sian fajfilon? Kial estas tiuj diskutadoj inter la ludistoj? Kial, kun la apliko de iomete da akvo la ludistoj rekuras?.

Sendube vi, kara amiko, pensos ke s-ro Serrano deziras moki vin. Ne, tute ne! Mi esperas, ke iu el vi troviĝos en sama aŭ simila situacio. Tio ja donus al mi kuraĝon por daŭrigi mian penan vojon kaj eĉ mi pensas, ke ni povus starigi, fondi asocion de "Amantoj de la Futbalo ne Komprenataj de liaj edziĝoj (A.F.K.E.)".

Ne pensu, ke mi forlasos mian mision, la disvastigon de Esperanto kaj la instruadon de mia edzino, por ke ŝi fariĝu moderna, edukita kaj inteligenta homa estaĵo. Mi neniam laciĝos!!.

Luis Serrano Perez.

LA HOMO VOLAS P. & CON!  
KUN ĈIUJ N. & CIOJ & MIKECON!



#### ANEKDOTOJ

La gasto en la restoracio alvokis la kelneron:

- Kion faras ĉi tiu muŝo en mia supo?
- Ŝajnas al mi, ke ĝi naĝas, sinjoro.

.....

- Aŭskultu, Johano, tiu bovido, kiun vi vendis al mi, mortis dum la pasinta semajno.

- Strange. Tion ĝi neniam faris ĉe mi.

.....

Amikoj inter si:

- Imagu, amiko, mia fileto ege similas al mi.
- Ne malgaju! Gravas, ke li estu sana.

.....



## ENTRENIATIONO, ĈU ESPERANTO EN FILMO ?

Antaŭ kelkaj monatoj TVE-2 elsendis, ene de serio pri spiona ĝenro, interesan filmon. La intrigo de *SEKRETA AGENTO*, jen la nomo de la filmo, estis sufiĉe alloga por sidiĝi dum du horoj antaŭ la televid-aparato. Dum la intercivitana milito, hispana intelektulo kiu luktis favore al la Respubliko marŝis al Londono, komisiita de la Registaro, por aĉeti la tutan karb-stokon de la plej grava karb-kompanio de Britio, kaj ĉi tiel eviti ke la ribelemaj trupoj akiros la karbon, kiuj ja bezonis ĝin. La intrigo dauriĝis per renkonto kun bela brita blondulino, kiu sciis nenion pri la afero kaj per sen-ĉesaj pruvoj de sekreta angla agento, kiu favoris al hispanaj ribeluloj, por atingi la personajn dokumentojn de la hispana spiono kaj malebligi la ontan kontrakton.

La intrigo ja allogis sed, kia rilato ekzistas inter ĉi ĉio kaj Esperanto? Nu vidu, la hispana spiono devis kontakti en Londono kun alia hispana agento kiu donos al li la necesajn informojn. La renkontejo de ambaŭ sekretaj agentoj estus la *Entrenationo Language Center* (Centro de la Lingvo Entrenationo). Entrenationo laŭ la intrigo de ĉi filmo estus internacia lingvo. La ĉefrolulo iris al tiu loko sub la preteksto eklerni Entrenationon, ĉar la alia hispana agento instruis tiun lingvon. Nu, ni lasu la intrigon kaj rigardu ĉi tiun lingvon kreita de tiu filmo: Entrenationo.

Ĉi lingvo, kiu mi preferus nomi *Esperanto enfilme*, pro ĝia granda simileco sendube baziĝas sur Esperanto. En la *Entrenationo Language Center* la ĉefrolulo estis bonvenata per la jenaj frazoj *Bona Dia e Bona Matina*. Tuj komenciĝis la unua klaso kaj kiam la profesoro ekkonis la lernonton, diris *Mi tri ĝojas*. Poste li uzis la frazon *Que son la?* (*Kio estas ĉi tio?*) kaj en la respondoj aperis la nomoj *tablo*, *eseg* (*seĝo*) kaj *cases* (*skatoloj*). Ankaŭ oni studis la numerojn kaj ĉi tie la simileco inter Entrenationo kaj Esperanto estas videbla, do vidu: *un, du, tris, quar, vin*. Resume jen la ĉefaj punktoj de la Entrenationo-gramatiko.

En alia parto de la filmo aperis la aŭtoro de la lingvo kaj ĉefa estro de la Entrenationa Movado, li estis afabla muljunulo kiu asertis ke la gelernantoj lernis Entrenationo Ĉefe *pro sia amo al la Homaro*, kiom da fojoj oni legis tion en E-revuoj? Same aperis eta diraĵo pri la Entrenationa Internacia Reto, kiam antaŭ mondmapo la Entrenationo-estro parolis pri la delegito en Nord-Rodezio.

Ja estus interese atingi kaj studi atente la libron sur kiu baziĝis tiu filmo. Ĉu Ian Fleming, la aŭtoro de la libro, konis iajn aspektojn de la Esperanto-movado kaj tiel revis pri ĉi Entrenationo? Ĉu Ian Fleming, aŭtoro ankaŭ de *James Bond l'agente 007*, konis Esperanton? Mi tute ne scias. Tamen tutcerte ke ĉiuj hispanaj geesperantistoj, kiuj vidis tiunokte tiun filmon, eksurpriziĝis kiam li aŭdis tiujn frazojn en Entrenationo aŭ Esperanto enfilme, tutcerte ili emis diri al la apudaj familianoj *Ha! Vidu tio estas Esperanto*. Kaj tutcerte ili tre fiere aŭdis la frazon de la ĉefrolulo kiam li asertis ke ĝi estus la lingvo de la estonteco.

Verkis C

.....

★═══════════★ BELA HISTORieto DE LA PACO ★═══════════★



(1) UNU FOJON IU KOLOMBINO, TRE BLANKA KAJ BELA, FLUGADIS, FLUGADIS, ĈIRKAŬ LA TERO... (2) SED ĜI NENIAM POVIS ALPROKSIMIĜI, ĈAR LA PORDO DE LA MONDO ESTIS FERMITA PER LA ARMILOJ DE LA HOMOJ. (3) TAMEN IUN TAGON LA AMO DE DIO MALFERMIS LA PORDON DE LA TERO... (4) KAJ LA BELEGA KOLOMBINO DE LA PACO VENIS LOĜI KUN LA HOMARO POR ĈIAM.

OS PACIFICADORES-Av. Cândido Lúcio, 420-Riachuelo- 30000-BELO HORIZONTE - M.Gerais - BRAZIL  
(Reprezo permesata en aliaj lingvoj, citante la fonton).



TRIA LECIONO (LECCION TERCERA)

Pronombres personales. El verbo (2).

Los pronombres personales son:

Mi = yo  
Vi = tu, usted  
Li = él  
Si = ella  
Gi = ello  
Ni = nosotros, nosotras  
Vi = vosotros, vosotras, ustedes  
Ili = ellos, ellas.  
Ci = tu (apenas usado.)

Los modos del verbo: Son infinitivo, participio, indicativo, imperativo, condicional. Las correspondientes terminaciones características son.

i = infinitivo	participio = inta, anta, onta.
u = imperativo	indicativo = is, as, os
us = condicional	gerundio = inte, ante, onte.

En pasiva, los participios terminan en: ita, ata, ota.  
En pasiva, los gerundios terminan en : ite, ate, ote.

Los tiempos simples son invariables. Número y persona se distinguen por el sujeto (nombre o pronombre) que acompañan al verbo.

En los tiempos compuestos, el participio varía según el número. En estos tiempos, aparece el participio en singular o en plural, según el número. Ejemplo:

- Mi estas studinta = yo he estudiado  
- Ni estas studintaj = nosotros hemos estudiado.

LECTURA

Hodiaŭ mi iras al la vendejo por aĉeti vestojn. Mi bezonas du pantalonojn kaj du ĉemizojn. Ĉu vi konsentas akompani min?

Jen la vendejo. Do, eniru.

Nun mi demandas pri la prezo.

Sinjoro, kiom da pesetoj kostas la pantalono? Ok mil pesetojn. Ĉu vi havas alian? Bonvolu montri ĝin al mi.

Mi ŝatas ĝin. Mi aĉetas ĝin.

Sinjoro, montru al mi iujn ĉemizojn.

Mi preferas la bluan. Kiom da pesetoj kostas ĝi? Tri mil pesetojn.

Kie estas la kaso? Mi deziras pagi.

Tie, sinjoro. Adiaŭ.

PRONUNCIACION

Letra "ĝ" se pronuncia como: dy.

## VORTARO

Hodiaŭ	= hoy	Jen =	he aquí
Vendejo	= tienda	Eniri =	entrar
Por =	para	Do =	pues, así pues
Aĉeti =	comprar	Nun =	ahora
Vesto =	ropa	Demandi =	preguntar
Bezoni =	necesitar	Pri =	sobre, acerca de
Pantalono =	pantalón	Komizo =	dependiente
Ĉemizo =	camisa	Kiom =	cuanto
Ĉu =	acaso	Da =	de
Konsenti =	estar de acuerdo	Peseto =	peseta
Akompani =	acompañar	Kosti =	costar
Ok =	ocho	Bonvoli =	hacer el favor
Mil =	mil	Montri =	mostrar
Alia =	otro, otra	Ŝati =	estimar, apreciar
Blua =	azul	Preferi =	preferir
Tri =	tres	Kie =	dónde
Kaso =	caja	Deziri =	desear
Pagi =	pagar	Tie =	allí

## PRAKTIKO POST LA TRIA LECIONO (PRACTICA PARA LA TERCERA LECCION)

Hodiaŭ Antono kaj Jozefo estas en la placo. Ili estas amikoj de la leono. Antono parolas; li demandas:

- Ĉu vi akompanos min al la vendejo de Johano? Jozefo konsentas:

- Ni iru al la vendejo de Johano!

La du amikoj, Antono kaj Jozefo, iras al la vendejo de Johano. Johano estas komizo en la vendejo. Ili du eniras en la vendejon por aĉeti du librojn.

- Johano, ĉu vi havas grandajn librojn? Montru al mi la bluan libron! Montru alian libron! Mi preferas la bluan libron. Ĝi estas granda. Mi bezonas ĝin. Ili aĉetas la bluan, grandan libron kaj demandas al Johano, la komizo:

- Kiom kostas la blua, granda libro?

- Ĝi kostas tri mil pesetojn.

- Do mi aĉetos du blujn, grandajn librojn. Kie estas la kaso? - Jen la kaso. Bonvolu pagi!

- Jen! Adiaŭ! - Adiaŭ, sinjoro!

Antono kaj Jozefo iras al la domo de Antono. Ili eniras en la domon de Antono. Ili estas en la domo de Antono. Jozefo parolas; li demandas laŭte al Antono:

- Ĉu vi ŝatas la libron?

- Mi preferas la leonon

- Do iru al la placo, al la leono, kaj parolu al ĝi.

- Mi konsentas. Mi iros al la placo kaj vi estos en la domo.

- Do adiaŭ, amiko!

- Adiaŭ, Jozefo! Mi akompanos la leonon en la placo.

SOLVO AL LA ŜAKPROBLEMO aperanta sur pago 22a

1. dF7-F5    2. pG6 x dF5

2. tA6-H6 mato!





BENATA SONGŔO

Ankoraŭ estas mallongtempe ekde kiam mi legis en la ekzemplero 11-a de *Boletín Informativo de la Andaluza Esperanto-Uniĝo*, frazon kiu devus esti orlitere presata prononcita de la Prezidanto de la Sveda Parlamento al liaj aŭskultintoj. Li diris **LA HOMOJ KIUJ JESAS KE ESPERANTO ESTAS NUR CENTJARAGŔA SONGŔO, MI RESPONDAS KE LA SONGŔO FAVORE AL LA MONDPACO ONI KALKULADAS EKDE PLI OL MIL JAROJ KAJ ĈIUJ NI, ANKORAŬ, SEKVAS ĜIN SONGŔANTE.**

La malamikoj de Esperanto kredas ke la monda esperantistara familio vivas super ekstera iluzio, aŭ ne realigebla utopio, kiam, reale, nur la unuaj travivadas en erara mondo.

Ni kore amas la PACON; ni kore defendas la ideon ke Esperanto povus esti vera mondpacilo ĉar estas tro agrabla inter personoj malproksimekstremaj, rilatiĝi reciproke per la interŝanĝado de iliaj ideoj kaj pensoj.

La facila lingvo Esperanto utilas kiel helpilo, sen la koncer-- naj malfacilaĵoj, kiuj enhavas ĉiu natura lingvo. La malrapida propagando de la Lingvo Esperanto dume la unua jarcento de ĝia kreado estas kaŭzata de la konvinkigaj bataliloj kiuj ni, la esperantistoj utiligas, la PRAVECO, SAĜECO ..., kaj certe, kun tiu ĉi armilaro ni, al neniu timigas kaj, eĉ malplie, ni al ili povas veni.

Ni devus imagi alian batalilon pli konvinka, pli alloga, plie el la tro uzitaj antaŭe. Kiuj, kien, kiel? Ha! Mi ĵetas la ideon; aliaj cerboj cerbumigu por trovi ĝin.

Estus granda ŝanco atingi de nia samlandano Sinjoro Francisco Mayor Zaragoza, ĵuse nomita aŭ elektita Direktoro de la UNESKO, helpon favore al Esperanto, kies monda organizado UEA kunlaboras, laŭ la Rezolucio de la Ĝenerala Konferenco en Montevideo 1954,

kondiĉe ke Esperanto jam montris ĝian utilecon "en la kampo de la internaciaj intelektaĵ interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo", ke li petu al la Ŝtatemembroj la enkondukon kaj instruadon de Esperanto en ĝiaj lernejoj.


Ĉu estus profita ke la hispana esperantistaro (aŭ monda) ni sendos amase niajn leterojn kun tiu ĉi peto? Sinjoro Mayor devas koni perfekte la pozitivan laboron de Esperanto kiel defendanto de la kulturo kaj de la paco ĉar li de longtempe kunlaboras en ĉi tiu Monda Organizo.

A. ESCAMILLA - Linareso (Jaeno)

.....  
**A N O N C E T O**  
=====

Nia kordova samideano José María Rodríguez Hernández komunikas al ni ke pro profesiaj kialoj li devis transloĝiĝi al Seviljo en Januaro. Lia kordova adreso restas tute valida, tamen li estos en Kordovo nur semajnfine kaj en Seviljo dum la restantaj tagoj. Se iu volas kontakti kun li en Kordovo estas prefere ne skribi ĉe li sed al la jam kutima Poŝtkesto 611, 14080 CORDOBA.

Li same pardonpetas al ĉiuj gesamideanoj kiuj dum la monatoj Januaro aŭ Februaro kontaktis kun la servoj de MONATE ĈE VI al la ARĤIVO DE AEU ĉar li dum tiuj monatoj ne povis akurate respondi ĉiujn. DANKOJN!

.....  


**Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian.**

- La Espero, L.L. Zamenhof



# NUN NI



\*\*\*\*\* JUNULARA ALDONAĴO AL GAZETO ANDALUZIA \*\*\*\*\*

OKAZIS dum la Toroksa Kongreso la Generala Asembleo de AEJ (Andaluzia Esperanto-Junularo), sed hej! ne pensu pri tute oficiala renkontiĝo, male ĝi okazis en ĉambro de la Restadejo, kie ni ĉeestis al la Andaluzia Kongreso de Esperanto. Partoprenis il ĝejnuloj kaj la plej grava konkludo de la kunveno rezumas per unu vorto: "EKLABORI!". Pro tio oni nomumis definitivan estraron:

- Prezidanto : José María Rodríguez Hernández (Kordovo/Seviljo)
- Sekretario : José Ignacio Bravo Lupiáñez (Granado)
- Voĉdonantoj : Francisco José Nieves Pavón (Jerezo)  
Eduardo González Ordoñez (Seviljo)  
Francisco Javier Romero Pareja (Malago)
- Reprezentantoj de AEJ ĉe la Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS) : Rikardo F. Albert Reyna (Malago/Madrid)  
Esther Morillas García (Malago)

Sed, atentu ni volas nek krei novan organizon kiu nur posedas komenc-literojn, nek agi laŭ definitiva kaj teda statuto, nek... bone nek labori diskutante en ĉambro dum la kongresaj tagoj.

## KION PRETENDAS AEJ?

Nur du konkretajn agojn:

- Unuigi la junularajn fakojn de la lokaj grupoj, por ebligi atingi oficialajn agnoskojn, helpojn, ktp, kio faciligos la disvolvadon de la junulara vivo ene de la grupoj.
- Helpi la diskonigadon de Esperanto en andaluziaj junularaj medioj.

Estas membroj de AEJ ĉiuj anoj de AEU malpli aĝaj ol 30 jaroj. Ĝis decembro de 1987 ni estis 23 AEJ-anoj, tamen dum 1988 ni estas certaj ke AEJ havos eĉ pli ol 30 membroj, ĉu multaj?... malmultaj? Tio ja ne gravas. Ni el ĉi paĝo nur invitas ĉiujn ĝejnulojn eklabori. Se vi estas membro de loka Esperanto-Grupo (ekz. Malago, Seviljo, Kordovo, Granado, Kadizo...) helpu la kunigadon de la esperantistaj ĝejnuloj, ĉi tiel ni ĉiuj povos atingi subvenciojn por labori, vojaĝi, propagandi, ktp.

Se vi estas junulo (eĉ ne membro de AEU) kaj loĝas en andaluzia urbo aŭ vilaĝo kie ne ekzistas loka E-Grupo petu al ni helpon se vi estas preta enirigi la ideon starigi E-fakon ĉe iu kultura asocio de via urbo aŭ vilaĝo. Unue oni povus okazigi E-kurseton, poste perleterajn eksterlandajn kontaktojn, ĉeeston al iu E-Kongreso... kaj laŭ tiu vojo krei pli-malpli fortan E-grupeton en via urbo.

Jae, por ĉi ĉio necesas helpojn, sperton kaj multajn aliajn aferojn. Ni intencas oferi al vi ĉion necesan. Kontaktu kun ni, se vi, junulo, estas preta EKLABORI.

## PROJEKTOJ DE AEJ

- Antaŭ ol la komenco de la venonta somero AEJ eldonos broŝuron por propagandi Esperanton ĉe la junularo de Andaluzio. Ni eldonos 1.000 ekz. Ankoraŭ ni ne finredaktis ĝin, do ni ege bonvenigas ĉiajn sugestojn, proponojn kaj projektojn.



La esperantista junularo de Seviljo estas komisiita de TEJO (la tutmonda junulara E-organizo) por ekigi kaj daŭrigi la kontaktojn kun junaj geesperantistoj de Nord-Afriko (Maroko, Algerio, Tunizio...). La seviljaj samideanoj ne nur organizis jam efike ĉi servon korespondante kun la tieaj gesamideanoj sed ankaŭ planis vojaĝi ĝis tiuj nordafrikaj dezertaj teroj por ebligi pli grandan personan kontakton.

Pro tio la seviljanoj atingis subvencion de la sevilja urbestro por aĉeti paron da kameloj. Jes! Tute certe. Temas pri selektataj kameloj kapablaj resti dum du monatoj ne trinkante... vinon! La foto montras al ni la kutiman tagan promenadon de la samideanaro kaj la bestoj tra la Maria-Luisa Parko.



Sciate ke samideano Cema, ĝis nun loĝanta en Kordovo, transloĝigis al Seviljo pro laboraj kialoj.

Ekde Januaro li laboras en la Trafika Departamento de Seviljo. En la foto ni povas vidi lin (maskita, kompreneble) en lia nova laborejo.

Tamen kelkaj seviljaj gesamideanoj kiam konis ĉi novaĵon demandis ĉu li laboras en la Tra-fika Departamento kaj ĉu "eĉ pri tio" ekzistas Stata Oficiala Departamento.



Mi estas unu el la 6000 oficialaj partoprenintoj de la Varsovia Kongreso. Post mallonga vizito al la parencoj en Hungario, ni vojaĝis al Lodz, dua urbo de Pollando, por partopreni la ILEI Konferencon. Ni loĝis en universitata domo tre komforte kaj ni manĝis en la universitata menservadejo kie ni povis, inter polaj pladoj, konversacii kun pluraj kongresanoj. Ĉiuvespere estis artaj programoj kaj kulturaĵoj bone elektitaj kaj prezentitaj. Ne mankis okazo viziti la urbon, ankoraŭ ne komplete restarigitan. Videblas signojn de la teruraj bombardadoj dum la lasta (espereble) mondmilito. Grandegaj amasloĝejoj kvartaloj ĉirkaŭas la malnovan centron kie ankoraŭ funkcias fabrikoj terure poluciantaj pro la forbrulo de karbo.

La Konferenca programo finiĝis per vojaĝo aŭtobuse al Varsovio. Dumvoje ni vizitis en Lowic interesan etnografian muzeon kaj en Zelazowa Wola, la naskiĝdomon de Chopin en kies ĝardeno oni prezentis mallongan koncerton de Chopin-muziko, bone ludata fortepiane de juna artisto. Post vespermanĝo en bona restoracio, oni kondukis nin al la kongresejo jam nokte. Ne facile ni trovis poste nian hotelon iom for de la centro. Matene ni iris al la kongresejo por la dokumentoj kongresaj.



Imagu la amason en grandegaj salonoj inter aro da ĝiĉetoj. Posttagmeze en la placo okazis la amuza amasa renkontiĝo gajigata de pluraj folkloraj grupoj internaciaj. La inaŭguro okazis du foje egale ĉar la teatro entenas nur 3000 sidlokojn. Same okazis por la plej grandaj artaj programeroj. Senombraj programoj disvolviĝis dum la semajno. Krom la kutimaj kongresaj aranĝoj elstaris grandnombraj teatraĵoj, filmoj, muzikprezentaĵoj. La tuta semajno estis bone reĝisorata. Ni partoprenis al kiel eble plej multaj programeroj kiuj estis por ni ĝuindaj, interesaj eble neforgeseblaj. Ni havis aron da okazoj de renkontiĝoj kun pluraj konataj kaj ne antaŭe konitaj samideanoj, ĝojaj kaj interesaj homaj kontaktoj plenigis la tutan tempon.

Oni devas konsideri la grandegan laboron faritan de la polaj esperantistoj kaj la grandan helpon donitan de la registaro. La kongreso okazis en la plej prestiĝa ejo de Pollando: la Palaco de Kulturo kaj Scienco kie okazis ankaŭ la antaŭa UEA Kongreso 1959 kie ni partoprenis kiel novbakitaj esperantistoj.

Tamen ne ĉio iris tute glate. La miloj da esperantistoj kiuj utiligis la trajnon por alveni, ne trovis eblecon forveturi. Por utiligi ekspres-trajnojn estas deviga la antaŭmendo de sidloko, por akiri ĝin estis bezonataj plurtagaj atendadoj antaŭ ĝiĉetoj en longegaj vicoj, vane. Ni komencis dimanĉe kaj nur vendrede ni sukcesis akiri la sidlokon dank'al interesiĝo de la Ĝenerala Direktoro de la Polaj Fervojoj.



Tiu malagrablaĵo tuŝis ankaŭ la paroprenintojn de la aliaj pluraj kongresoj okazintaj en Pollando (Junulara, Katolika, Instruista, ktp). Tiu fakto perdigis al ni la eblecon ĉeesti plurajn interesajn programerojn, plie ni devis rezigni la planitan viziton al Krakovo kaj Prago, sopirataj vidindaĵoj.

Impresoj pri Pollando ne estas facile eldireblaj. Ni restis tie tro mallonge, ni vidis ne sufiĉe, ni havis malmultajn kontaktojn kun poloj. Ni intersanĝis opiniojn kun italaj samideanoj: Varsovio estas kiel Napoli postmilitite "okupita" de la usonanoj. Taksiistoj petis dolarojn kaj ne havis certajn prezojn, "nigraj" mensanĝistoj ĉie, ili donis ege pli grandan kvanton da mono ol la oficiala sanĝo; oficialaj sanĝistoj kiuj klopodis ne doni kvitancon, poste bezonata por pagoj en hotelo aŭ aliaj ŝtataj oficejoj (ni devis pagi dolarojn por telefoni Italian eĉ senrezulte).

En grandaj magazenoj troveblas sufiĉe multaj varoj, privataj vendistoj kompletigas la ŝtatajn mankojn ĉiuangule en la centro. Varsovio aspektas bela ĉefurbo, la malnova parto estis bone restarigita kaj la nova havas modernan domojn, grandajn aleoj kaj vastaj parkoj centrurbe, mildigas la ĝenon de grandega trafiko de aŭtoj kaj busoj kiuj brulas terure poluciantan nafton.


Tute alie aspektas la provincurboj, ili estas pli modestaj ĉu en novaj ĉu en malnovaj restarigitaj domoj. La industria urbo estas grizegaj. Antaŭ ne longe ni legis ke Pollando estas la plej pluciata lando en Eŭropo. La kamparo estas ne moderne ekipita kaj ne bone flegata, sed la vojaĝanto povas ĝui belajn verdajn herbejojn kun grandegajn arbarojn.

#### ELISABETTA kaj ALDO FORMAGGIO (Chiavari - ITALIO)

### ŜAKPROBLEMO 1/88

La blankuloj ekludas kaj matigas post du paŝoj. Vidu ke la nigra reĝo estas ĉirkaŭirita de la kontraŭa armeo kaj ke la nigra damo estas preskaŭ senutila nur atakante la turon.

La solvon al ĉi tiu problemo vi trovos sur la paĝo , sed antaŭ ol legi ĝin pruvu solvi la ŝakproblemon vi mem.



Kiel noti ŝaklud-movojn en Esperanto. Apud la komenca minuskla litero de ĉiu ŝakludilo (reĝo-damo-turo-kuriero-ĉevalo-peono) oni devas skribi la lokon kie ĝi situigas (A1-A2-F4-H8...) kaj poste la lokon kien ĝi iras. Ekzemple, se ni antaŭenirigas la blankan peonon kiu situigas en ĉi tiu desegno dekstre de la reĝo ni notos p<sub>H</sub>2-H4. Se iu ŝakludilo estas prenata ni skribos "x", ekz. ĉi-desegne se la nigra damo prenas la blankan turon ni notos d<sub>C</sub>8 x t<sub>A</sub>6.





## JANUARO

L	K	Me	J	V	S	D
			<u>1</u>	<u>2</u>	<u>3</u>	
4	5	<u>6</u>	7	8	9	<u>10</u>
11	12	13	14	15	16	<u>17</u>
18	19	20	21	22	23	<u>24</u>
25	26	27	28	29	30	<u>31</u>

## FEBRUARO

L	K	Me	J	V	S	D
1	2	3	4	5	6	<u>7</u>
8	9	10	11	12	13	<u>14</u>
15	16	17	18	19	20	<u>21</u>
22	23	24	25	26	27	<u>28</u>
29						

## MARTO

L	K	Me	J	V	S	D
			1	2	3	<u>4</u>
			5	6	7	<u>8</u>
			9	10	11	<u>12</u>
			13	14	15	<u>16</u>
			17	18	19	<u>20</u>
			21	22	23	<u>24</u>
			25	26	27	<u>28</u>
			29	30	31	

## APRILIO

L	K	Me	J	V	S	D
			<u>1</u>	<u>2</u>	<u>3</u>	
4	5	6	7	8	9	<u>10</u>
11	12	13	14	15	16	<u>17</u>
18	19	20	21	22	23	<u>24</u>
25	26	27	28	29	30	

## MAJO

L	K	Me	J	V	S	D
						<u>1</u>
2	3	4	5	6	7	<u>8</u>
9	10	11	12	13	14	<u>15</u>
16	17	18	19	20	21	<u>22</u>
23	24	25	26	27	28	<u>29</u>
30	31					

## JUNIO

L	K	Me	J	V	S	D
			1	<u>2</u>	3	<u>4</u>
			5	6	7	<u>8</u>
			9	10	11	<u>12</u>
			13	14	15	<u>16</u>
			17	18	19	<u>20</u>
			21	22	23	<u>24</u>
			25	26	27	<u>28</u>
			29	30		

## JULIO

L	K	Me	J	V	S	D
			1	2	<u>3</u>	
4	5	6	7	8	9	<u>10</u>
11	12	13	14	15	16	<u>17</u>
18	19	20	21	22	23	<u>24</u>
<u>25</u>	26	27	28	29	30	<u>31</u>

## AUGUSTO

L	K	Me	J	V	S	D
1	2	3	4	5	6	<u>7</u>
8	9	10	11	12	13	<u>14</u>
<u>15</u>	16	17	18	19	20	<u>21</u>
22	23	24	25	26	27	<u>28</u>
29	30	31				

## SEPTEMBRO

L	K	Me	J	V	S	D
			1	2	3	<u>4</u>
			5	6	7	<u>8</u>
			9	10	11	<u>12</u>
			13	14	15	<u>16</u>
			17	18	19	<u>20</u>
			21	22	23	<u>24</u>
			25	26	27	<u>28</u>
			29	30		

## OKTOBRO

L	K	Me	J	V	S	D
			1	<u>2</u>		
3	4	5	6	7	8	<u>9</u>
10	11	<u>12</u>	13	14	15	<u>16</u>
17	18	19	20	21	22	<u>23</u>
24	25	26	27	28	29	<u>30</u>
31						

## NOVEMBRO

L	K	Me	J	V	S	D
			<u>1</u>	2	3	<u>4</u>
			5	6	7	<u>8</u>
			9	10	11	<u>12</u>
			13	14	15	<u>16</u>
			17	18	19	<u>20</u>
			21	22	23	<u>24</u>
			25	26	27	<u>28</u>
			29	30		

## DECEMBRO

L	K	Me	J	V	S	D
			1	2	3	<u>4</u>
			5	<u>6</u>	7	<u>8</u>
			9	10	11	<u>12</u>
			13	14	15	<u>16</u>
			17	18	19	<u>20</u>
			21	22	23	<u>24</u>
			25	26	27	<u>28</u>
			29	30	31	

1.- ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO. JEREZO 13a / 15a de Aŭgusto.

10.- HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO. VALENCIO 14a / 16a de Julio.

12.- TENDARO DE LA HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO. MONISTROL 31a Marto / 4a Aprilo.

73.- UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. ROTTERDAM (Nederlando).

44.- INTERNACIA JUNULARA KONGRESO. ZAGREB (Jugoslavio) 16a / 22a de Julio.